

Norvega Esperantisto

ESP ER AN TO B LA D E T

N-ro 2
1965

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
31-a (37-a) jaro
Monata

Innvielsen av Norges 1. og verdens 241. esperantogate: «ESPERANTOVEGEN»

Lørdag, den 12. desember 1964, ble Norges første gate hvis navn er knyttet til det internasjonale hjelpespråk Esperanto, høytidelig innviet på Jørpeland.

Det var i 1961 at formannen for Jørpeland's Esperantoklubb for første gang foreslo for en del herredstyre-medlemmer at en av gatene eller plassene ble knyttet til navnet esperanto. Til å begynne med ble denne idéen nok møtt med et smil, men i løpet av 1962, etter at samme forslag ble gjentatt også for andre herredstyre-medlemmer, fikk klubbens formann en oppfordring om å sende forslaget inn skriftlig og i offisielle former.

Så gikk tiden uten at det hendte noe. Da klubben «Pacaj Batalantoj» i 1963 skulle feire sitt 25-års jubileum, ble det gjort nye henvendelser til kommunen, da man trodde denne begivenhet kunne feires sammen med innvielsen av en esperantogate. Men det gikk ikke så fort. Reguleringen av hele Jørpeland-området var i støpe-skjeen. Den 28/5-64 mottok klubben

gjennomslag av et brev fra formannskapet ved Strand Kommune til Bygningsrådet, hvor det bl. a. heter:

«Saka vert å senda Jørpeland byggningsråd som nå vert bede om å ta spørsmålet opp på vanleg måte.»

En henvendelse til kommuneingeniøren ble besvart med at det var oppnevnt en gatenavnkommité som om kort tid ville behandle saken, så den kunne legges frem for herredstyrets 29 mann til endelig avgjørelse. Dette «historiske» herredstyremøte fant sted den 29. oktober 1964. Esperantoklubbens formann var selv til stede og kunne overbevise seg om (etter en del diskusjon om det skulle hete esperantogata, esperantostrato eller esperantovegen) at det enstemmig ble vedtatt å kalle gaten *Esperantovegen*.

Kommuneingeniøren lovet å påskynde bestillingen av gateskiltene som så ble levert henimot slutten av november. Innvielsen skulle så finne sted 5. desember. Da vi imidlertid gjerne så at arrangementet ble vist i fjernsyn, henvendte vi oss til Es-

peranto-Forbundet som ved velvillig assistanse av kaptein Bugge-Paulsen ordnet det slik at vi kunne henvende oss til TV's representant i Stavanger. Esperantoklubbens formann reiste så til Stavanger, og det ble avtalt at Fjernsynets representant, S. Omland, skulle komme til Jørpeland sammen med Trygve Kvalvåg som var oppnevnt som Forbundets representant, og at dagen for innvielsen definitivt ble fastsatt til den 12. desember 1964. Under sitt opphold i Stavanger, fredag den 11. desember, konfererte esperantoklubbens formann med Ivar Holm, og samme dag kl. 14.30 ble den forestående innvielsen av Esperantovegen utførlig kringkastet av den lokale Stavangersender under «Rogalandsnytt».

Til tross for en fin blå himmel og pent vær på fredag, forandret været seg over natt radikalt. Da den store dagen opprant, var det storm og regn av en slik art at man var på nære nippet til å avblåse hele arrangementet. — Men heldigvis lettet det såpass at høytideligheten kunne utvikles etter planen. Veien var for anledningen satt i god stand, utvidet og nygruset, skiltene var kommet på plass. I den ene enden av veien var der satt opp en æresport, 4 m høy og 3½ m bred, på toppen med følgende inskripsjon på begge sider:

*Esperantogate nr. 1 i Norge,
nr. 241 i verden.*

Pyntet med to norske og ett esperantoflagg og grønne grener ruvet den godt i landskapet. Da klokken nærmet seg 14.00, hadde det samlet seg en god del folk i gaten, bl. a. representanter fra Strand kommune, formannskapet, Staalverket, fra skolen, lensmann og politi, og noen andre. Musikken nærmet seg, og det ble feststemning til tross for det dårlige været.

Da arrangementet, som nevnt, ble avvirket etter planen, mener vi at det beste bilde vi kan gi av denne begivenheten, er å gjengi programmet. Dette var følgende:

1. Presis kl. 13.45 marsjerer hornmusikken, 50 gutter og piker, fra Fjelltun skole, så svinger de fra Austbøvegen gjennom æresporten inn til Esperantovegen.
2. Musikken stiller opp ved hjørnet av Østvoll- og Esperantovegen. Musikk.
3. Formann Tr. Müller hilser de tilstedeværende velkommen og gir ordet til varaordfører M. Karlsen.
4. Varaordfører Magnus Karlsen taler på vegne av kommunen.
5. Avduking. Magnus Karlsen tar vekk det store esperantoflagget som ligger over navneskiltet og som holdes på begge sider av fru Asbjørg Kvalvåg og Tr. Müller.
6. Musikk.
7. Müller takker Karlsen og gir ordet til representanten for Norvega Esperantista Ligo, Tr. Kvalvåg.
8. Trygve Kvalvåg taler.
9. Müller takker Kvalvåg.
10. Musikk — til slutt «Ja vi elsker».
11. Hyggelig samvær i Gjestgiveriet.

Det kan tilføyes at denne tilstelning ble spandert av Strand kommune. Til stede var utenom klubbmedlemmene herr Trygve Kvalvåg m/ frue, Fjernsynets representant samt endel representanter for myndighetene og skolen. — Brev og telegrammer fra Forbundet og andre esperantoklubber ble lest opp. Trygve Müller og Trygve Kvalvåg forklarte i sine taler hvor ønskelig det var å få et internasjonalt hjelpespråk som var forholdsvis lett å lære, innført i alle verdens skoler. Innvielsen av Esperantovegen på Jørpeland som den første i Norge ble karakterisert som en viktig milepæl mot det endelige mål.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de redakcio: Boks 942, Oslo

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—

1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—

1/8 p. kr. 19,—.

La subskriboj

Oni informas pri fervora agado ĉie. Oni kolektas subskribojn. Universala Esperanto-Asocio planas la laboron. Ni devas fari ĝin, kontentaj, ke iu pensas por ni!

Klopodu por subskribigi urbestrojn, parlamentanojn, registaranojn. Sed ne forgesu ĉiujn aliajn — viajn konatojn, amikojn kaj familianojn!

Kolektu subskribojn!

5-kronulado al la Informfondaĵo de N.E.L.

Listo 5:

Torstein Andersen, Fredrikstad
Magnhild Nordheim, Stangebrua
(kr. 25,—)

Tore Haug, Oslo

Entute 3 pagintoj.

(Ekster la kronulado multaj donacis sumojn, por tiuj oni sendis kvitancojn rekte).

Klubaj jubileoj

La 9-an de marto Noktomeza Suno en Harstad estos 30-jara.

La 10-an de marto Ascendo en Halden estos 30-jara.

Sciigoj de N.E.L.

La Nordlanda Esperanto-Kongreso. Ni memorigas vin pri la Nordlanda Esperanto-Kongreso, kiu okazos en Oslo 19.—22. junio, kaj dum kiu okazos la landa kunveno de NEL. Estas tre dezirinde ke laŭeble multaj norvegoj partoprenu tiun kongreson, kaj per frua aliĝo vi faciligos la laboron de la Loka Kongresa Komitato. Ĉiuj kluboj kaj rektaj membroj ricevis aliĝilojn, pliajn vi povos ricevi de NEL. La aliĝilo estas en 3 partoj, sed ne estas necese sendi ĉiujn partojn samtempe. Vi povos sendi la aliĝon al la kongreso tuj, kaj poste sendi la partojn kun mendo pri loĝejo kaj ekskursoj. Plej urĝas por la LKK ricevi la unuan, la aliĝan parton.

Kongresaj glumarkoj. Aĉetu kaj uzu la kongresajn glumarkojn! Unu folio de 20 markoj kostas kr. 0,50 + afranko. Ni povas sendi ĝis 12 folioj por afranko de kr. 0,30.

Jaro de Internacia Kunlaborado. La folioj kun subskriboj al U. N. komencas alvenadi. Ĉu vi jam kolektis multajn subskribojn? Pliajn foliojn por subskriboj vi ĉiam povos ricevi de NEL. — UEA ankaŭ eldonis glumarkojn okaze de la Jaro de Internacia Kunlaborado. Folio de 10 markoj kostas kr. 0,80 + afranko, kaj estos riceveblaj ĉe NEL.

Taskotabelo por la kluboj. — *Marto.* Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La kasisto sendas poŝtan enkasigilon al la membroj, kiuj ankoraŭ ne pagis la kotizon.

La Estraro.

Informoj de la Ekzamena Komisiono

Preseraro. En Norvega Esperantisto n.ro 7/1964 duloke estis preseraro en la nomo de ekzamena kandidato. Temis pri f.ino Oliv Ekkeren, ne pri s.ro Olav Ekkeren.

Ordinaraĵ printempaj ekzamenoj. Ekzamenoj okazos ĉirkaŭ la 1a de Junio 1965. Instruistan ekzamenon oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Sauda, Stavanger, Tromsø kaj Trondhejmo. Oni anoncu sin sur la presitaj skemoj riceveblaj de la ekzamena komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, antaŭ la 1a de Majo. Personoj, kiuj faros la ekzamenon ne en Oslo, plenu po 2 — du — skemojn. *Plenigu la skemojn precize kaj komplete! — Aliĝoj kiuj alvenos post la 1-a de Majo, ne estos konsiderataj.*

Adresoj de la lokaj ekzamenaj komitatoj:

OSLO: Ekzamena Komisiono, Boks 942, Oslo. Poŝtĝirokonto 100 34.

BERGEN: S-ro Kjell Offerdal, Sv. Hjetlands vei 6 B, Bergen.

HAUGESUND: S-ro Olav Thormodsen, Boks 59, Haugesund.

SARPSBORG: S-ro Johan Hammond Rosbach, C. E. Holters vei 7 C, Sarpsborg.

SAUDA: S.ino Elna Matland, Brekkeveien 50, Sauda.

STAVANGER: S-ro Trygve Kvalvåg, Oddehagen, Hafrsfjord.

TROMSØ: S-ro Arne Høgseth, Sjøgate 5, Tromsø.

TRONDHEJMO: S-ro Ragnv. Rian, Boks 109, Trondhejmo.

Ekzamenoj dum la landa kunveno de N.E.L. La landa kunveno de N.E.L. okazos en Oslo 19.—22. junio. Kandidatoj, kiuj deziras fari elementan aŭ superan ekzamenon dum la landa kunveno, anoncu sin, sur la presitaj skemoj (vidu supre), rekte al la Ekzamena Komisiono antaŭ la 19/5.

NB! Personoj loĝantaj en lokoj, kie troviĝas ekzamena komitato, ne povos fari ekzamenon dum la landa kunveno.

Ekzamena Komisiono de N.E.L.
C. Støp-Bowitz, Prezidanto

Rudolf Nilsen:

LA VERSO

*Kiel lanc' povas servi skribil',
kanton pikmortiganta armil'.*

*Longe loĝas la kant' en l' anim'
malgraŭ vundoj, sen iu ajn tim'.*

*Kaj estiĝas kviet' en la kor',
aŭ ekscit', maltrankvilo, dolor'.*

*Eble kant', se ĝin kaptas skribil',
mortsangadaŭdas en tabla ekzil'.*

*Naskiĝas la vers' — ho, feliĉ'!
Jen sunoj, vapor',
fajrmuĝo en ĉiu kor-niĉ'.
Batalo en kor'!*


*Ĝojegas per kant' en mondspac'
venkinta tempest'.
De dia feliĉo donac':
jen vers'! Kia fest'!*

*Jen kant' de kompostmaŝinar',
matricaj murmuro kaj knar',
jen peza susur': gazetar'.*

*Presado — liter' post liter',
por vers' enteriga afer':
kor-tombo, jen ĝia esper'.*

*Sed malgraŭ la vers-enteriĝ'
por ĝia anim' je tagiĝ'
okazos el tomb' releviĝ'.*

Trad. Tr. R.



El
niaj
kolegoj

La redaktoro de New Zealand Esperantist uzas sian redakcian paĝon de la n-ro 270/64 por tre pensigaj vortoj. Ni ja ofte aŭdas atakojn kontraŭ nia lingvo, kaj rifutas ilin. Sed ĉu ni scias, kiel respondi? Jen s-ro profesoro C. J. Adcock, Victoria University of Wellington:

«ARTEFARITA»

Ĉefartikolo en la Hawkes Bay Herald-Tribune de Sep. 12a temas pri «Ĉu la mondo iam akceptos komunan lingvon?» Estas grave ke ĵurnalo opinias ke tia temo estas inda de tiom da atento sed bedaŭrinde lia redaktora moŝto ne favoras nian lingvon. Li diras ke Esperanto ne sukcesas kaj pro simpla kialo: ĝi estas artefarita, sen kulturo, kaj do homoj malakceptos ĝin.

Tiu estas grava akuzo kaj devas esti serioze pripensata. Ĉiu Esperantisto bone scias ke la lingvo efektive ne estas artefarita rilate vortojn kaj ke cetere ĝi jam havis pli ol ducentjaron kiel fokuso de internacia kulturo, sed restas iom plu por konsideri. Nacia lingvo estas uzata por intimaj hejmaj aferoj dum multaj jaroj, kaj la vortoj akiras emociajn signifojn kiujn logika klarigo ne povas komuniki per aliaj vortoj kiel en vortaro. Estas pro tia intima, emocia signifo ke lingvistoj ofte akuzas ke artefarita lingvo ne povos sukcesi, sed ili forgesas grav-

an fakton. Tian efikon la nacia lingvo havas nur por la persono kiu uzis ĝin kiel hejmlingvon. Se oni uzus, ekz. la anglan lingvon, por internaciaj interparoloj la fremdlanda uzanto ne spertus ian superecon kompare kun Esperanto tiurilate. Estas familioj kiuj uzis ankaŭ Esperanton kiel hejmlingvon kaj por ili la Esperantaj vortoj havas nuancojn kiuj mankas por ni. Tiaj nuancoj ne restas en la *formo* de la lingvo sed en la *multflankaj spertoj* de la uzantoj. Do estus granda eraro elekti nacian lingvon tiucele. Oni perdus la bezonatajn avantaĝojn kaj akirus multnombrajn malavantagojn.

Mi esperas ke samideanoj funde pensos pri tiaj aferoj. Se ni deziras konvinki klerajn homojn pri la supereco de nia lingvo necesas ke ni ne nur fanfaronu pri ĝi sed lerte klarigi kiamaniere la kontraŭantoj eraras. Tiucele ni certe malsukcesos se ni havas komprenon pri la lingvaj principoj aplikeblaj.

* * *

Nur unu komenton: La uzo de — aŭ manko de — komoj estas laŭ la originalo.

Haro.

Esperanta ralio

estas organizota de Maurice G. D. Jaumotte, estrarano de UEA, de Antverpeno al Vieno. La ralio alvenu la 11-an de julio 1965 posttagmeze en Vieno. Ĝi prenos la vojon: Ostende—Bruĝo—Gento—Antverpeno—Lieĝo—Aachen—Köln—Frankfurt—München—Salzburg—Vieno.

Esperantistaj aŭtomobilistoj anoncu sin al partopreno al:

Maurice G. D. Jaumotte, De Bruynlaan 44, Wilrijk, Belgujo, aŭ al la organiza komitato de EEK 1965.

OSKAR BRAATEN:

«La Pol'cisto»

Estis malfrue en posttagmezo iun malvarman tagon en marto. Mi staris klinante min super la balustrado de la kara, malnova ponto kaj fikse rigardis la riveron. Mi staris tie multajn fojojn antaŭe, kaj malnovaj, forgesitaj tagoj proksimiĝis al mi kaj fariĝis vivantaj. —

— Bonan!

Mi turnis min. Malgranda knabo staris antaŭ mi kaj rigardis min ĝuste en la vizaĝon, malgranda kvinjara, ruĝvanga bubo kun grandaj, bluaj okuloj.

— Estas malpermesite stari tie kaj detrui la balustradon! li diris. — Estus plej bone, ke vi gardu vin, ĉu vi ne vidas ke mi estas pol'cisto?

Komprenoble mi vidis, ke li estas «pol'cisto», li surhavis longan surtuton kun brilaj latunbutonoj en du vicoj, li staris kun la manoj sur la dorso kaj kun la stomako antaŭen — nenio mankis tie!

— Nu, vi pardonu, pol'cisto! mi diris. — Eble mi nun devas pagi punmonon, kiom kostas?

Li staris serioza, maĉante ion, li kraĉis, la neĝo ricevis brunajn glicirizajn makulojn.

— Kostas mil milionojn da kronoj! li diris.

Bone, estis ja iom multe, sed certe ne helpis marĉandi, nur pagi kaj ŝajni gaja. Mi elpoŝigis ĉiujn miajn moneretojn, supozeble estis entute ĉirkaŭ tridek—kvardek oeroj.

— Bonvolu, vi do kontrolu mem, ĉu estas ĝuste! mi diris. Li etendis unu sian manon. Ĝi estis tro malgranda. Li etendis ankaŭ la alian. Tamen ili apenaŭ sufiĉis. Li restis senhelpe staranta kun la moneroj en la manoj. Tiam li faris abruptan kapskuon tiel ke lia ĉapo defalis. Ĝi estis

vasta kaj granda. Liaj manoj denove liberiĝis. Li fiere rigardis min. — Vi ne triumfu super mi! li pensis.

— Sed ĉu vi ne havas poŝojn por via mono? mi diris. — Pol'cisto ja ne povas iri kun la ĉapo en la mano!

Li ne estimis min sufiĉe por respondo, li lasis la ĉapon sur la neĝo kaj komencis serĉfosi en unu sia poŝo surtuta. Li fosis profunden kaj pli kaj ankoraŭ pli profunden ĝis la ruĝaj fingropintoj aperis el inter la subŝtofo kaj la ŝtofo je la malsupra rando de la surtuto.

— Truo! li nur diris. Li fosis en la alia poŝo de la surtuto. Li denove trafosis poŝon. — Truo! li ree diris. Dum momento li staris iom senhelpa, sed jen la petola vizaĝeto heliĝis. Li malbutonis la surtuton, li enmetis la manon, li rigardis min, la severa pol'cisto eĉ preskaŭ ridetis. Li ja havis la internan poŝon! Kaj la mano energie plukis la moneretojn, ili tintis malsupren en la internan poŝegon, la ĉapo rehavis sian lokon.

— Kiel vi do nomiĝas, mia knabo? mi diris, mi forgesis, ke li estas pol'cisto, li eĉ mem ne memoris tion en la urĝo.

— Torleif, Sagveien n-ro 12, 5 jarojn la dekkvaran de marto, la teretaĝo! li diris.

— Nu tiel, vi do estas 5-jara hodiaŭ, Torleif?

— Jes, panjo aĉetos harmonikon! Torleif diris.

— Sed ĉu vi do scias ludi? mi diris.

— Ne, sed panjo ja povas instrui al mi! Torleif diris, li komencis butoni la surtuton, la manoj revenis sur la dorson.

— Vi vere havas belan surtuton! mi diris.

— Certe vi vidas, ke estas veraj pol'cistobutonoj? Torleif diris.

— Adiaŭ do! mi diris. — Nun vi bone gardu viajn mil milionojn!

— Mi ŝparos ĝis mi havos la tutan poŝon plena de mono, kaj tiam mi aĉetos aŭtomobilon! Torleif diris.

— Jes ja! Vi certe ankaŭ scias konduki aŭton, tia bravulo kia vi estas? mi diris.

— Ne, sed panjo ja povas instrui al mi! Torleif diris, li metis la manon al la ĉapo kaj salutis, li paradis for meze en la strato kun la manoj sur la dorso.

Mi ĉirkaŭvadis dum unu horo aŭ du, kaj jen mi denove renkontis Torleif. Tiam li sidis sur la ŝtuparo ekster la vendejo, li turnis la vizaĝon al alia direkto, kiam li ekvidis min, li tute ne plu aspektis kiel «pol'cisto».

— Estas malpermesite sidi tie kaj detrui la ŝtuparon! mi diris. — Kostas mil milionojn da kronoj!

Li ne respondis.

— Donu la monon tuj! mi diris, igante min kolera.

Tiam li rigardis min, iomete nesekura.

— Mi havas neniom da mono, ĉar estis ja truo ankaŭ en tiu poŝo! li diris.

Mi enŝovis duonkronon en lian manon.

— Jen, nun vi denove ekŝparu por aŭto! mi diris. — Ne, atendu iomete, Torleif, ne tiom urĝas, ĉu vi ne povas resti ĉi tie kaj iomete babili kun mi?

Torleif jam estis iom for en la strato.

— Mi ne havas tempon, mi devas rapidi foruzi la monon antaŭ ol mi perdos ĝin! li diris.

Trad.: Grupo Esperantista de Trondheim.

Esperanto en radio

ALVOKO

al ĉiuj esperantistoj en tutmondo

Komence de ĉi tiu jaro Svisa Kurtonda Radio ricevis novan kaj evidentan tre bravan direktoron. Unu el la unuaj pruvoj de tiu lia braveco estis la likvidigo de la elsendoj en esperanto ĉe Svisa Kurtonda Radio Bern. Por atingi rekonsideron de tiuj elsendoj mi alvokas la tutan esperantistaron, skribu al

Schweizerische Radio- und Fernsehgesellschaft
Kurzwelldienst
Esperanto-Programo
Giacomettistr. 1

3000 Bern (Svislando)

kaj demandu ĝentile, kial oni ne plu elsendas en esperanto. — Petu ankaŭ viajn amikojn kaj korespondantojn — kiuj eble ne legis ĉi tiun alvokon aŭ ne konsideris ĝin sufiĉe grava — ke ankaŭ ili skribu nepre al Svisa Radio. Kunhelpu ankaŭ vi, ke la esperantistoj povos prezenti imponan demonstracion al la direkto de Radio Svislando!

M. F.

*

Radio Pekino, unu el la plej fortaj radiostacioj, komencis paroli en Esperanto dufoje ĉiusemajne (sed la duan fojon nur ripetigis la sama programo) ekde la 19/12 1964.

Ondoj: 51,0 m. (5880 kcs)

40,4 m. (7440 kcs)

30,1 m. (9955 kcs)

Dato kaj horo: Vespere en ĉiu vendredo kaj sabato, de la horo 20.00 ĝis la horo 20.30 (laŭ la horsistemo de Greenwich).

Enhavo: Informoj kaj muziko.

RECENZOJ

Fabeloj de H. C. Andersen

Tradukis L. L. Zamenhof, Eldonejo Heroldo de Esperanto. Havebla ĉe Esperantoforlaget A/S, Oslo.
Prezo: kr. 20,—.

Post 40 jaroj ni ricevas novan verkon de nia majstro, L. L. Zamenhof, la kvaran volumon de La Fabeloj de H. C. Andersen. Tiujn fabelojn mi preskaŭ nur legis en ĝia esperanta vesto, kvankam mi ja kiel norvego havas neniun malfacilon legante la danan lingvon.

Posedante jam la tri unuajn volumojn de la Fabeloj, kiujn mi tenas kvazaŭ trezoron, mi kun scivolo malfermis la kvaran. Kaj mi ne estis seniluziigita.

Andersen prezentas siajn rakontojn kiel kukojn el bakforno, varmaj, krispaj kaj manĝopretaj. Li estas la Malbela Anasido, la sentaŭgulo, mallaŭdata kaj primokata, kiu tamen postvivis por pravigi sian genion. Ni estas ravataj pro la malfeliĉoj de la Malbela Anasido kaj plezurigitaj je ĝia cigiĝo.

Zamenhof kaj Andersen — ambaŭ mondcivitanoj, ambaŭ malŝovinistoj kaj homaranoj. «Mi kaptis ideon por la plenaĝulo kaj tiam rakontas por la malgranduloj, memorante, ke la patro kaj patrino ofte aŭskultas, kaj al ili oni devas doni ion por la penso» — Andersen skribis en letero de 1843.

La 4a volumo sin distingas de la ceteraj per iom pli longaj rakontoj en novela formo. El tiuj la rakonto «Historio de la dunoj» kaj la fabelo «La filino de la marĉa reĝo» staras en aparta klaso. Sed legante la ceterajn oni rapide trovas, ke ĉiuj estas perloj, «Peco da perlo», kiu priskribas vojaĝon de Kopenhago ĝis Korsør, «Lasta sonĝo de maljuna

kverko», Anneto, Bela, Sterkskarabo, kaj fine «Kion patro faras, estas ĉiam ĝusta», nia norvega fabelo «Gudbrand en la Deklivo» en dana maniero.

Jes, tiujn belajn fabelojn kaj rakontojn oni ĉiam povas legi kaj relegi. Ĉerpitaj el la pratempa fabelmondo kun ĝia stranga galerio da bestoj kaj monstroj, la fabeloj kunfandiĝas kun la realeco, kie ĉiam venkas la Bono super la Malbono.

Jen la libro por granda kaj malgranda, egale taŭga kiel deklamaĵo en kunvenoj kiel stud-objekto en lego-cirkloj. Kiuj iam povas forgesi la fabelojn: Historio de unu patrino, La knabino kun la alumetoj, La malgranda marvirino, La najtingalo, La novaj vestoj de la reĝo el la unuaj tri volumoj, por menci iu kelkajn.

La 4an volumon cetere plivalorigas la bonegaj desegnaĵoj de s-ro Antoni Uniechowski. La unuaj tri volumoj nun estos reeldonitaj.

Atentu kiel Zamenhof turnas la frazojn. Kiel juna Esperantisto mi konsideris la stilon de Zamenhof iom malnovmoda, sed post studado de liaj verkoj mi venis al tiu konkludo, ke neniun esperanto-verkisto estas pli moderna. La aspekto estas ĝuste valora apartenaĵo al lia stilo. Ĝuste en tio kaj la vortfarado Esperanto distingiĝas de la aliaj lingvoj. Ĝuste tio faras ĝin memstara, vivanta lingvo, ne iu senseksa, sensuka «homunculus».

Kio do distingas la Zamenhofan stilon? Se oni legas la verkaron de Zamenhof, oni tuj frapiĝas de la fluanteco de la frazoj kaj la fleksibleco kaj internacieco de lia stilo, libera de ĉia rigideco. 1) Li neniam uzas tro longajn kunmetitajn vortojn, kio speciale estas germana apartaĵo. Ekz. li skribas: sablaj dunoj anstataŭ sablodunoj, poŝa tranĉilo — ne poŝtranĉilo. 2) Li metas la neakcentitajn vortetojn antaŭ la akcentitajn, preskaŭ en la ombron: «Oni ne povas

lin nomi Jutlandano. Ili havigis al ili manĝaĵojn. Vi estas por mi kiel frato. Morten, kiu min dungis. Li aŭdis tie tre laŭtan paroladon. 3) Multfoje li ŝanĝas la ordon de la vortoj por ilin emfazi: Li fiere frapis. Ke Georgon oni liberigis. Ŝi prenis prefere lin. Kiujn sekvis aliaj homoj piede. 4) La aspekta sistemo (por priskribi, montri daŭron aŭ ripetiĝon de la ago, ĝeneralecon): La sablo kaj la ŝtonetoj batadis lian vizaĝon kaj turniĝadis ĉirkaŭ li. 5) Tiun principon li uzas ankaŭ rilate al la multe diskutata pasiva problem: Li preferas esti mortigita de ili ol esti pinĉata de la anasoj, pikata de la kokinoj, puŝata de la servistino kaj dum la vintro suferi ĉiaspecajn turmentojn. (Rimarku la diferencon inter *mortigita* kaj la ceteraj participoj.) La fabelo en la daŭro de mil jaroj estis transigata de unu cikonio-patrino (ripetiĝo). La knaboj ne kantis, kiam la posedanto de Borreby estis metata en la teron (samtempeco). Subite ia mano ĉirkaŭis la skarabon; ĝi estis kunpremita kaj turnata tien kaj reen. Ĉu mi ne estas tiel same bona kiel la granda besto, kiu ĉiam estas prisedata, striglata, vartata (kio okazas ĝenerale, ripete). Ĉi tie la skarabo estis metita en malnovan lignan ŝuon (unufoja okazaĵo). La vilaĝano eniris, la putraj pomoj estis metitaj en la veturilon, kaj fine ili alveturis.

El la supraj frazoj oni povas tiri sekvantan konkludon: Zamenhof uzas la ata-participon (part. de nuntempo) por priskribi tion, kio kutime aŭ ripete okazas, aŭ kio ankoraŭ ne estas finita, la ĝeneralan. Li estas, estis, estos amata, turmentata.

La ita-participon (participo de preterito, pasinta tempo) li uzas por montri tion, kio unufoje okazas, la agon kiel tutaĵon, kie la ago estas identa je aŭ transiras en sian rezulton. Kiel do ekz. la simpla verbo

«pafis» estas uzata por ĉiuj tempoj de pasinto (pafis, estas pafinta, estis pafinta), tiel «pafita» estas uzata en la tempoj perfekta, imperfekta kaj pluskvamperfekta. La helpa verbo *esti* (kiel en la franca kaj angla) do povas signifi jen iĝon jen staton, laŭ la cirkonstancoj. Oni povas diri ke la signifo de la kombino «*estis aŭ estos ita*» ŝanĝiĝas laŭ la situacio en la rakonto. La pluskvamperfektecon oni povas precizigi per adverboj: jam, jam antaŭe, pli frue (kiel oni ordinaras faras eĉ se en la naciaj lingvoj oni havas rimedojn por esprimi la pluskvamperfekton). Se oni volas *akcenti* la *daŭron* aŭ *ripetiĝon*, oni uzu la daŭran aspekton ata.

Mi eble uzis multajn ekzemplojn, sed tio por montri la Zamenhofan stilon, kia ĝi aperas en ĉiuj liaj verkoj. Por konvinkiĝi oni devas legi kaj studi lian verkaron. Por tiu celo nenio estas pli rekomendinda ol la profundigado en lia majstra traduko de la Fabeloj de H. C. Andersen.

H. Fr.

Japana kantaro

Kompilita de Kanto-traduka grupo de Nagoya Esperanto-Societo. 64 p. Paper-bindita. Eldonis 1957, Amo-Akademio, Tenmori, Kozoji, Aliĉiken, Japanujo. Prezo: \$ 0,55, Resp. 8 aŭ egalvalora, sendkosto 10 %.

Ni ĵus multe pensis pri Japanujo pro la Olimpiado en Tokio, verŝajne ankaŭ pro la venonta UK de Esperanto en la sama urbo. Oni povis aŭdi japanan popularan melodion en la sporta radio elsendado, kaj eble ŝatas pli. Nun alvenis kantaro, kolekto de 41 japanaj kantoj kune kun Amoista kanto krom 11 konataj kantoj esperantaj kaj tradukitaj. O suno mia, Stenka Razin kaj serba kanto eĉ estas verkoj de Kanto-traduka grupo.

Laŭ antaŭparolo unu celo estas plivarmigi amikecan atmosferon en Esperantistaj rondoj en Japanujo; dua celo estas konigi al fremdaj samideanoj sencojn kaj melodiojn de japanaj kantoj. La poziaĵoj ampleksas ĉiujn sencojn, ek de infanaj ludoj ĝis atombombo.

Por la japanaj melodioj troviĝas muziknotoj. La skaloj uzitaj estas kvintonaj, sestonaj (sed ne plendutaj) kaj naturaj (aŭ puraj) minoroj. Tiel, kondukanto malgranda mi trovas en nur unu kanto, kiu eble celas eŭropan stilon. Pro preskaŭ nur viraj rimoj estas multe da apostrofoj, alie la Esperanto estas bona. Oni enmetas korektojn pri preseraroj, escepte de kelkaj en la muziknotoj.

Rekomendinda por studoj, la libro havas klarigojn kaj kelkajn belajn vinjetojn. — Preso kaj papero estas bonaj.

L. S.

Norvega bibliografio

Norvega bibliografio
de Lars Kåre Hunnes.
Oslo 1964. 38 p. 2,50 n.kr.

Lars Kåre Hunnes vere meritas koran dankon pro sia «Norvega bibliografio». Ĝi estas grava mejloŝtono en la historio de la norvega esp.-aro.

Pro ekonomiaj kaŭzoj N.E.L. povis nur stencili ĝin, kaj bedaŭrinde la stencillaboro ne estas sufiĉe bone farita. Mi mencias ankaŭ, ke oni ne trovas la mallongigon «P.» (Poemo) en la listoj pri mallongigoj (p. 5 kaj 7). Plue la mallongigo de portreto plej ofte en bibliotekoj estas «port.», ne «por.». Rilate al gazetoj mi preferus referencon ankaŭ al koncernaj paĝoj, ĉar estas ofte relative malfacile trovi la kajernumeron, se la jarkolekto estas bindita.

La bibliografio ampleksas kaj beletristikon kaj fakliteraturon. La ĉapitro pri fakliteraturo estas mallonga.

Sur tiu ĉi kampo multaj taskoj atendas nin, sed koncerne beletristikon la evoluo estas tre pozitiva.

120 beletraj verkistoj estas reprezentitaj. Entute 341 el iliaj verkaĵoj, grandaj kaj malgrandaj, estas tradukitaj, inkluzive 78 nepresitaj verkoj. La nombro de tradukoj do estas tiel granda, ke oni nepre bezonas bibliografion.

En 1903 oni eldonis en Parizo la unuan esperantan tradukon de norvega literaturaĵo en Fundamenta Krestomatio: «La porcio de glaciaĵo» (En Portion Is), novelon de Lars Dilling.

Multaj famaj verkoj estas tradukitaj, ekzemple en 1925: «Reaperantoj» («Gjengangere» de Henrik Ibsen), en 1934: «Gaja knabo» («En glad Gut», de Bj. Bjørnson), en 1938: «Victoria» (de Knut Hamsun) kaj en 1951: «Peer Gynt» (de Henrik Ibsen).

Superrigardo statistika pri tradukitaj verkoj: 1903-12: 24, 1913-22: 9, 1923-32: 13, 1933-42: 55, 1943-52: 47, 1953-62: 99.

Estas strange noti, ke oni tradukis 160 poemojn kaj 56 himnojn. Tio signifas, ke Esperanto eble estas la plej ofte uzata traduklingvo, se temas pri norvegaj poeziaĵoj. La ekzaktajn ciferojn por la aliaj lingvoj mi ne povas doni.

Mi esperas, ke Lars Kåre Hunnes trovos tempon por ellabori bibliografion pri originala literaturo en Esperanto de norvegoj kaj pri literaturo tradukita el Esperanto en la norvegan lingvon.

T. A. Høeg

Bela bildlibro

La Kvin Fratoj. 16-paĝa, grandformata kajero. Eldonis Ĉina Esperanto-Ligo 1964.

Jena popola rakonto estas tradukita de Laŭlum kun bildoj de Vang Jukjuan, kies buntaj kaj belaj desegnaĵoj

Skirestado en Norvegujo

Studenta Esperanto-Societo en Bergen aranĝos en kunlaboro kun «Gangaren» skirestadon venontpaske, 10.-20. de aprilo, en tre konvena tereno sur Hardanger-altebenaĵo. «Gangaren» estas ekskursiva societo, kiu ĉefe aranĝas «fakajn» ekskursojn, ekz. geologiajn, botanikajn ktp. kaj havas membrojn inter studentoj kaj instruistoj.

Ni loĝos en somerpaŝtejoj dometoj, reciproke malproksimaj je pluraj kilometroj. Komuna provizado, sed ĉiu dometo preparos aparte la manĝaĵon. En la sama regiono situas la «rondira» reto da kabanjoj de Norvega Turist-Asocio. Partoprenantoj havos la okazon rondiri per tiuj kabanjoj dum la duona tempo kaj pagos tiukaze ĉe ni kaj do tiel ŝparos monon, ĉar en la asociaj kabanjoj la nutraĵo estas sufiĉe multekosta.

Haro

EN LA ZOOLOGIA ĜARDENO

La konkurso en n-ro 9/10, 1964

La solvo estas:

Impalo, elando, kapreolo, cervo, apro, ibekso, talpo, mandrilo, gibono.

Tiun solvon trovis nur unu, s-ro Carl Henning Baklund, Grubhei, kiun ni gratulas. Ni samtempe informas lin, ke la impalo apartenas al la antilopoj. Vidu «Bildlibro pri bestoj» (Daily Mail).

MANDALS SPAREBANK

MANDAL



Ni rekomendas la restadon al naturamikoj. Al luksamantoj ĝi ne konvenos. En malbona vetero, kiam oni plejvole ne skiadas, ni ekzercos nian lingvon per diversaj taskoj kaj konkursoj. Esperantistoj nome loĝos en aparta dometo.

Oni aliras: 1) Per aŭtobuso Bergen—Kinsarvik—Garden. 2) Per aŭtobuso Haugesund - Kinsarvik - Garden. 3) Per trajno Oslo—Finse, de kie unu el ni montros la vojon. Manĝaĵo kaj domloko verŝajne kostos po persono ĉ. n.kr. 130,—.

Pliaj informoj: Arnljot Kyllingstad, Bøhmergt. 22, Bergen, Norvegujo.

Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista

La Komitato de U.E.A. komisiis al tri el siaj membroj, s.roj G. Grattapaglia, M. Jaumotte kaj T. Sekelj,

starigi klubon por esperantistaj aŭtomobilistoj. La klubo estas nun starigita, kaj anoncis sin multaj membroj el diversaj landoj, sed ĝis nun neniu el Norvegujo.

La ĉefaj celoj de la klubo estas: eldonadi aŭtorevuon, vortaron kaj frazarojn por aŭtomobilistoj, gvidlibrojn, instrukciojn kaj mapojn en Esperanto; organizi reton de Delegitoj «SOS-aŭtoservo», kiuj helpas membrojn, kiam ili havas difekton dum vojaĝo en fremda lando, kies lingvon ili ofte ne konas.

La iniciatintoj fiksas la kotizon por la jaro 1965 (kiu inkluzivas la abonon al la revuo) je 50 belgaj frankoj (= 14 steloj = n.kr. 7,00), kiujn oni povas sendi al s.ro M. Jaumotte, De Bruynlaan 44 — Wilrijk-Antwerpen, Belgujo, poŝtĉekkonto 1700.10.

La metala insigno (simila al tiu de la naciaj aŭtistaj aŭ turistaj kluboj) kostas 20 belg. frankojn (n.kr. 2,80).

Halse og Harkmark Sparebank

MANDAL



Nordlanda Esperanto-Kongreso



en Oslo
19/6-22/6
1965

INFORMILO 3

1. *Aliĝu* tuj al la Kongreso, ni petas! Speciale pro la enloĝigado estas nepre necese informi la Lokan Kongresan Komitaton pri partopreno. Uzu tiuokaze la unuan (supran) parton de la aliĝilo kaj forsendu ĝin tuj al L.K.K., Postboks 942, Oslo. Se vi ankoraŭ ne scias ĉu vi povos partopreni en la ekskursoj, vi nur forprenu tiun trian (malsupran) parton kaj postsendu ĝin kiam oportune. Tial la aliĝilo estas truigata en tri lokoj.

2. *Motivo de la glumarkoj*: Kastelo de Akershus, la malnova fortikaĵo el la mezepoko situanta ĉe la haveno apud la urbodomo. Havante grandan stokon ni deziras pli da aĉetantoj! Kostas nur 50 oeroj por 1 folio kun 20 glumarkoj krom afranko 30 oeroj (por 1—12 folioj).

3. *Esperanto-filmo pri Oslo* estos prezentata dum la Interkonatiĝa Vespero sabate 19/6. En la sama kunveno okazos la oficialaj salutoj de repre-

En nia tempo, kiam tre multaj homoj veturas aŭtomobile, tiu klubo signifos tre gravan praktikan utiligon de Esperanto, kaj ni rekomendas al ĉiuj norvegaj esperantistaj aŭtomobilistoj aliĝi al ĝi. La unua numero de ĝia revuo jam aperis.

Samtempe oni alvokas teknikistojn, kiuj deziras helpi, ĉu al la kunmetado de la vortaro, ĉu al la redaktado de la revuo.

zentantoj de eksterlandaj esperanto-organizoj.

4. *Ordена promocio «Pro Merito»* okazos en nomo de Norvega Esperantista Ligo dum la ferma festeno mardon 22/6. Certe estos interesa travivaĵo por la eksterlandanoj.

5. *La vidindaĵojn de Oslo* oni povos viziti dum 2 ekskursoj, la unua en urba sabaton 19/6 posttagmeze kaj la dua ekskurso eksterurba dum tuttaga aranĝo kun lunĉo en aerlibera restoracio en la Popola Muzeo en Bygdøy (kie ankaŭ troviĝas la vikingaj ŝipoj kaj la floso de Thor Heyerdahl).

6. *Kongres-libreto* kun la fina programo detala pri tiuj aranĝoj kaj sciigoj pri kunvenejoj, vidindaĵoj k.t.p. aperos en marto kaj estos havebla de la aliĝintoj.

Oslo, 31/1 1965

La Loka Kongresa Komitato

*

La Loka Kongresa Komitato



Antaŭe de maldekstre:

S-ino Astrid Mansrud
John Berggreen, prezidanto
C. Støp-Bowitz

Malantaŭe de maldekstre:

Alfred Skyberg
Kjell Gustavsen
Otto Koren

50-a Universala Kongreso de Esperanto

Tokio 31/7 — 7/8 1964

Sub la Alta Protektado de D-ro Yuji Shibata,
Prezidanto de la Japana Akademio

DUA BULTENO

La Dua Oficiala Bulteno de la Universala Kongreso estas sendita al la ĝisnunaj aliĝintoj.

En ĝi troviĝas la provizora programo, informoj pri la Loĝiga Servo, Ekskursiva Servo, Postkongreso, Infana Kongreseto, Junulara Kongreso, Belarta, Oratora kaj Foto-Konkursoj, Oomoto-Festivalo kaj ĉiuj koncernaj mendiloj.

La Duan Bultenon ricevas nur la aliĝintoj al la Universala Kongreso.

OFICIALA BANKEDO

La Loka Kongresa Komitato deziras atentigi pri la eksterordinara Oficiala Bankedo de la 50-a Universala Kongreso.

La Bankedo okazos en mirinda japanstila ĝardeno-restoracio; dum la Bankedo okazos prezentado de japanaj dancoj kaj muziko.

Detaloj troviĝas en la Dua Bulteno.

INFANA KONGRESETO

Jam estas malfermita la aliĝado al la 10-a Internacia Infana Kongreseto, kiu okazos en la kadro de la 50-a UK.

Kvankam la limdato por aliĝo estas la 30-a de junio 1965, L.K.K. petas la interesigantojn sin anonci jam antaŭ la 30-a de aprilo. Detaloj troviĝas en la Dua Bulteno.

STATISTIKO

(ĝis 16/1-65): Alĝ. 1, Arg. 4, Aŭstral. 21, Aŭstrujo 7, Bahamoj 2, Belg. 7, Braz. 9, Britujo 41, Bul. 11, CAR 1, Ĉeĥ. 1, Dan. 15, Finnlando 6, Fr. 81,

Germ. 40, Hind. 1, His. 6, Hongk. 2, Hung. 5, Irl. 1, Isr. 2, It. 29, Jap. 565, Jug. 10, Kameruno 2, Kan. 4, Mar. 2, Meks. 2, Mon. 2, Ned. 32, Norv. 11, NovZ. 11, Poll. 22, Port. 1, Rum. 1, Sovet 1, Sved. 47, Svisl. 12, Urug. 3, UAR 1, Usono 44, Venez. 3.

Entute 1069 el 42 landoj.

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa Sekretario

UNESCO-novajoj

Ŝlimriveroj funde de la hinda oceano

Interregistara Oceanografa Komisiono sub aŭspicio de Unesko eltrovis nombron da sulkoj en la fundo de la Bengala Golfo. La plej granda sulko estas ĉ. 100 metrojn profunda kaj 3 km larĝa. La esploroj indikis jenan kaŭzon. La grandaj hindaj riveroj, kiuj fluas en la Bengalana Golfon (ekzemple la Gango), demetas sian ŝlimon sur la kontinentan breton ĉirkaŭ la marbordo. Eble dufoje en ĉiu jarcento tiu amasiĝinta ŝlimo deglitas de la breto en la profundaĵojn, kie ĝin forportas submaraj fluoj. Tiuj lavangoj de ŝlimo rapide fluaj elfosas el la oceana fundo la trovitajn sulkojn, ĝis 800 km for de la marbordo.

«Instruistoj por Afriko»

La tria eldono de «Instruistoj por Afriko», ĵus eldonita de Unesko, listigas vakajn oficojn por la lernojaro 1964/65 en afrikaj duagrada kaj pli altaj lernejoj. Entute prezentigas 1300 vakojn en 21 landoj, laŭ du sekcioj: unue tiuj en universitatoj, kaj due tiuj en aliaj lernejoj. — Kandidatoj turnu sin al la *landaj varbo-centroj*, jam establita en 40 el la 116 ŝtatoj-membroj de Unesko.

Laŭ Unesco-Features kaj UEA-Informservo

Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

Klubo Esperantista en Oslo

3/12-64. La prez. John Berggreen bonvenigis la ĉeestantojn kaj precipe la invititajn partoprenantojn de la komenca kurso gvidita de Einar Gustavsen, ankaŭ nian gaston (la prelegonton) Alf M. Berggreen.

Plie li informis ke la klubo ricevis grandan donacon de s.ino Aagot Sletterød, nome buston de D-ro Zamenhof, skulptitan de la patro de nia membro Rolf Bugge-Paulsen. En la nomo de la klubo la prezidanto kore dankis al s-ino Sletterød pro la tre valora donaco. En la estonteco ĝi ĉiam staros sur la podio dum niaj kunvenoj, li promesis.

La hodiaŭa programo komenciĝis per kantado de «La Espero». Poste La Kluba Ĥoro kantis fanfaron.

Ĉar Astrid Mansrud malsaniĝis, C. Støp-Bowitz je mallonga avizo prelegis pri «La Poemoj de Zamenhof». D-ro Zamenhof verkis 9 poemojn, el kiuj la «Preĝo sub la verda standardo» estas la plej sentoplana kaj «La Espero» estas la programkanto de la tuta Esperanto-movado. Nenie Zamenhof malkaŝis pli de si mem ol en siaj poemoj, kaj ili vekas laŭtan eĥon en la koroj de tiuj kiuj laboras por la Esperanto-movado. Li admonis la ĉeestantojn legi la poemojn ĉar en ili ni vidas nian majstron.

La Kluba Ĥoro kantis novan tre viglan kaj belan kanton «Dominique» kaj rikoltis fortan aplaŭdon.

La ĉefpunkto de la programo estis prelego de inĝ. Alf M. Berggreen: «Rakettforskning og romferder». Komence li donis resumon en Esperanto kaj daŭrigis norveglingve. Li donis al ni superrigardon pri la evoluo de la raketoj, pri la raketprincipo (interna premo kaj kontinua eksplodo),

pri la utilo k.t.p. Dank' al la raketoj kaj spaceksperimentoj jam hodiaŭ la homaro akiris enormajn sciojn kaj avantaĝojn, ekz. en la teritorio de veterprognozo, aviado, radjo kaj televido. Tio ankaŭ havas kaj havos utilon por la industrio. — Pri la estoneco la plej optimistaj personoj eraris, ĉar ĉio evoluigis multe pli rapide ol oni imagis. Post ekz. 5 jaroj oni certe povos surterigi (aŭ surlunigi!) homojn sur la lunon kaj rehavigi ilin al la terglobo. Plie, post 10 jaroj oni verŝajne povos establi staciojn en la spaco.

La ĉeestantoj sekvis la treege interesan paroladon kun intensa atento kaj rekompencis ĝin per forta aplaŭdo.

Post la kafopaŭzo montriĝis filmo en kunrilato kun la prelego.

Ĉar estis la lasta klubkunveno antaŭ kristnasko, la tabloj estis ornamitaj per kandeloj. — Fine okazis pakaŭkcio, bonhumore kaj instigante gvidita de Einar Gustavsen, rezultante en kr. 175,- al la Informfondaĵo de N.E.L.

«Mara Vento», Haugesund.

3/11. La kunvenon partoprenis ankaŭ eksterlanda gastulo, nome la tre konata nederlanda esperantisto, tradukisto kaj ano de la Akademio, s-ro F. Faulhaber el Amsterdamo. La prez. tutkore bonvenigis lin esprimante la ĝojon ke s.sano Faulhaber trovis okazon — dum sia vizito en Norvegujo — veni ankaŭ al Haugesund.

Sano Faulhaber interese kaj instrue paroladis pri esperanto kiel literatura lingvo akcentante la gravecon ke la esperantistoj subtenu la literaturon por ke ĝi fariĝu ĉiam pli forta faktoro en la movado.

La paroladinto kiel duan parton de sia programo laŭtlegis du amuzajn historiojn en Esperanto. La simpatia gastulo estis danke aplaŭdata.

Estis decidate ke la decembra kun-

Fino Rita Exner, 1 Berlin 30 West, Steinmet-str. 58, D.D.R., deziras kor. kun eksterlandanoj. Aĝo 27. — Ludas violonon. Pentras.

Nissim, Meir Bait 4, Melĉen Beĥovot, Israelo, deziras koresp. Intereso: poŝtmarkoj.

S.ro Jules Leburgue, *Croix*, rue J. B. Delescluse no. 66, Francujo, dez. koresp. Aĝo: 81. Interesoj: Esperanto, kaj poŝtmarkoj.

28-jara ĉeĥoslovako dez. kor. kaj interŝ. bildkartojn, revuojn, gramofondiskojn k.t.p. S.ro Jozefo Jelínek, Meziborí 183/1, okr. Most, Ĉeĥoslov.

Svisa poŝtoficistino 22-jara dez. kor. pri landoj, kutimoj, diskuti aktualajn problemojn kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj aliaĵojn. Kathrin Schneider, Poŝtoficejo, 3000 Bern 25, Svislando.

Mi dez. kor. kaj interŝ. Esperantaĵojn, poŝtmarkojn, poŝtkartojn. Kiril Hlebarov, Goĉe Delĉev n.ro 8, *Petriĉ*, Bulgarujo.

Norsk Esperanto-Forbund (Norvega Esperantista Ligo)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

Esperantoforlaget A/s (Eldonejo Esperanto A/s)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradresse: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79

Cefdelegito de U. E. A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
C. E. Holters vei 7 C, Sarpsborg: - Uzu tiun
adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.
Telefona: 54 7 27

veno okazu en festa kadro. — La prez. transdonis salutojn el la jubilea festo de la Esperantoklubo de Bergen. La kunveno daŭris ĝis kiam ni meznokte devis akompani s-anon Faulhaber al la ŝipo per kiu li vojaĝu al Bergen.

5/12. *Festkunveno* en la bela salono de «Skipperforeningen» kie la festkomitatanoj estis zorgintaj pri tre plaĉe aranĝitaj festotablo.

La relative multajn ĉeestantojn bonvenigis la prez., kaj ni komencis kantante vigligan kanton. Programulo estis Sv. Loge Pettersen kiu vive kaj interesokapte rakontadis pri sia lastsomeraj vojaĝo* al Anglujo. Kiel kutime lia nun tre konata 30-jara aŭto «Amanda» ludis gravan rolon en liaj vojaĝtravivaĵoj. Per siaj rakonto kaj tre belaj kolorlumbildoj li konigis al ni tre plaĉajn kaj pitoreskajn lokojn de tiu tradiciplena lando kun tiom da historiaj interesaĵoj. — Estis programo tre ŝatata, kaj fortan kaj meritan aplaŭdon rikoltis la programulo.

En paroladeto la prez. memorigis pri la naskiĝtaga datreveno de d-ro Zamenhof menciante ankaŭ la «Tago'n de la libro» kaj petante la ĉeestantojn studrigardi la aranĝitajn librotablojn. S-ano J. Sortland memorigis pri la Tago de la homaj rajtoj.

Okazis ellotado, kaj fine oni fervore dancis. La gajatmosfera kaj sukcesa kunestado daŭris ĝis la matenaj horoj.

Korespondu!

Deziras kor. s.ro Albert Geeraerts, ĉ. 40-jara, Belgradestr. 72, *Mechelen*, Belgio.